# La Ora Rajdanto

ESPERANTO-KLUBO SCHWERIN N-RO 149 (4/25)

**Informilo el la landa ĉefurbo de Meklenburgio-Antaŭpomerio**

## Solena aranĝo okaze de 120 jaroj de Esperanto en Ŝverino

*Jam dum aŭgusto 2025 la ĵurnalistino Katja Haescher intervjuis la klubanojn dum kluba vespero pri la 120-jara E-historio en Ŝverino. Nia solena aranĝo okazis la 6-an de septembro 2025 en apuda domo de la Kirko de la Sankta Paŭlo. Pro la samtaga unua lerneja tago en kelkaj E-familioj partoprenis nur 19 gastoj al la festo.*

*Komencis la solena aranĝo per dudekminuta videofilmo pri la 120-jara historio de Esperanto en Ŝverino de Ralf Kuse. Sekvis du festprelegoj de André Christian Weber pri la UK en Aruŝa 2024 kaj la partopreno de la UK en Brno ĉijare kune kun japana Esperantisto. En la ĉirkaŭaĵo de la preĝejo la gastoj partoprenis urban rondiradon preter diversaj konstruaĵoj de la Monda Kultura Heredaĵo de UNESKO, gviditaj de Franz-Peter Kurtz kaj Ralf Kuse.*




www.esperanto-sn.de

*Poste la gastoj uzis la eblecon, tagmanĝi laŭ siaj gustoj.*



*Je la 14-a posttagmeze ni komune ĝuis bonan koncerton de Birke kaj Bertilo. Inter la kantoj eĉ estis ekkonita famkonata kanto de la Beatles.*



*Post la aplaŭdo la gastoj uzis la eblecon manĝi membakitan kukon kaj trinki tasojn da kafo.*



*Je la 17-a finis la aranĝo per komuna purigado de la ĉambroj de la Sankta-Paŭlo-Komunomo.* *-roko-*

**Mia trajnvojaĝo al la UK en Brno**

*Post komuna tagmanĝo en la Ŝverin-a restoracio „Stadtkrug" sinjoro Namba kaj mi zigzage trajnveturis tra Germanio.*



*Ni vidis diversajn vidindaĵojn en Berlino, Nurenbergo kaj Munkeno. De tie ni daŭrigis tra Salzburg kaj Vieno al Brno. Komforte mi loĝis en la hotelo Continental, kie mi kelkfoje matenmanĝis kun afablaj gesamideanoj el Koreio kaj Svisio. Ĉiutage mi trairis la parkon „Lužánky" kaj surgrimpis ŝtuparon por atingi la kongresejon. Sabate vespere mi vizitis la Movadan Foiron, kie multaj suborganizoj prezentas sin. Samtempe ĝi estis bonega okazo saluti sam- kaj alilandajn konatojn.*




*La oficiala malfermo tradicie okazis dimanĉe antaŭtagmeze. Vespere ni komune busveturis al la burgo „Špilberk", kie en la korto ĉeĥaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj*

# EL LA KLUBA VIVO

*atendis nin. Post la vespermanĝo ni ĝuis belan programon kun popoldancoj. Dum la sekvaj tagoj mi partoprenis en kelkaj kunvenoj kaj ankaŭ vizitis la libroservon.*



*La ekskurso kiu plej bone plaĉis al mi, gvidis nin unue al la kastelo Valtice. Post rondirado tra la salonoj de la kastelo kaj bongusta tagmanĝo ni pluveturis al vinkelo, kie spertulo klarigis al ni multajn detalojn pri la vinproduktado. Poste ni komune en gaja rondo gustumis kvin diversajn vinojn. Katalin kaj Silvain eksterordinare bone instruis Esperanton. Tial mi ofte partoprenis en iliaj lecionoj por lerni. Ĉifoje ni kunsidis en la korto de la kongresejo kaj uzis ĵetkuban hazardludon por plibonigi nian esprimo-kapablon. Ke ankaŭ Vilhelmo, nia gasto el Kubo, partoprenis en ĉi UK, ni ambaŭ nur poste rimarkis, kiam li vizitis nin en Ŝverino.*
*Kompreneble ankaŭ la urbo Brno ofertis diversajn vidindaĵojn. De la hotelo mi per tramo post mallonga tempo atingis la urbocentron, kie mi promenis, vespermanĝis kaj admiris multajn belajn konstruaĵojn. Jam la 6-an fojon mi partoprenis en bonege organizita Universala Kongreso kaj ĝuis la kunvenon kun longjaraj kaj novaj gekonatoj. – aw -*

*La renkontejo estas Klöresgang 1 (apuda enirejo, unua etaĝo) en la buroo de la vojaĝoficejo „ReiseService Schwerin“, kie ni kutime renkontiĝas ĉiun unuan lundon monate je la 17-a horo.*

Esperanto- Klub Schwerin

***2026***


| | |
|---|---|
| *05.01.* | *traduka vespero de la libreto “Schwerin für die Westen-tasche” kun la aŭtoroj<br>- ĉiuj* |
| *02.02.* | *vojaĝraporto pri Vjetnamio<br>- Ralf* |
| *28.02.* | *“WIR”-aranĝo en Kastelparka-Centro<br>- ĉiuj* |
| *09.03.* | *vojaĝraporto pri Sudkoreio<br>- Birke* |

*Dum ĉiu kluba vespero eblas konsultaĵoj laŭ antaŭa demando por interesitaj gelernantoj!*

# LAMA INFORMAS

## Aŭtoro deziras Esperanto-version de sia poŝlibreto pri Ŝverino

*Dum nia januara kluba vespero ĉeestos d-ro Löser kun edzino, kiu deziras tradukon de sia libreto „Schwerin für die Westentasche“ – „Ŝverino por la veŝtopoŝo“ en Esperanton. Se la tasko sukcesos, certe estos bona varbado por nia lingvo.*




## Gazetartikolo de Katja Haescher en Ŝverina Popolgazeto

*Preskaŭ tutpaĝan artikolon aperigis la ĵurnalistino Katja Haescher en nia loka gazeto la 9-an de septembro 2025.*



Seite 22 HEIMAT Montag, 15. September 2025

### Mit Esperanto um die Welt

Von Katja Haescher

**Shverino estas bela urbu. Schwerin ist eine schöne Stadt. Und sie hat eine eindrucksvolle Esperanto-Vergangenheit – 120 Jahre sind es in diesem September.**

SCHWERIN – Ludwik Zamenhof wusste, was er tat. Er eliminierte die sprachlichen Stolperfallen. Verschiedene Geschlechter, Deklinationen, Sonderformen. Esperanto sollte leicht zu lernen sein und zur Verständigung von Menschen unterschiedlicher Muttersprachen beitragen. Der Augenarzt war in der vielsprachigen Stadt Bialystok aufgewachsen und hatte die Reibereien zwischen den Ethnien erlebt. Würden Menschen sich möglicherweise besser verstehen, wenn es eine neutrale Sprache gäbe – so die Idee von Zamenhof, der 1887 die Grundlagen der Plansprache Esperanto veröffentlichte.

Es wär eine Idee, die überall auf der Welt Freunde fand. Wenn der Schweriner Franz-Peter Kurtz umreißen soll, was ihm seine Beschäftigung mit Esperanto gebracht hat, dann sagt er: „Einen Sack voll Reisen.“ Dreimal haben er und seine Frau in verschiedenen Ländern an Hochzeiten

Die Schwerinerin Marie Hankel gehörte zum Vorbereitungskomitee des 4. Esperanto-Weltkongresses in Dresden.

In der Werdervorstadt in Schwerin ist eine Straße nach Marie Hankel benannt.

André Weber, Anita und Franz-Peter Kurtz und Ralf Kuse (v.l.) gehören zum Schweriner Esperanto-Klub.

## Altvalora fotolibreto pri 120 jaroj de Esperanto en Ŝverino




*La germanlingva fotolibro (102 paĝoj) kun ĉiuj gravaj dokumentoj de la Ŝverina E-historio estas mendebla kiel CEWE-fotolibro por 85,- € plus sendokostojn aŭ senkoste en jpg-formato por la poŝtelefono.*

**redaktoro:** Ralf Kuse, **retpoŝto**: rok.ovo@mail.de **aperas:** kvaronjare
**La Esperanto-Klubo Ŝverino estas loka grupo de la Germana Esperanto-Asocio**